

Gustav Falke,

La timemuloj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Printempe, kiam blovis vent',
demandis ili kun timsent':
Ĉu estos la vetero
agrabla de l' somero?

Kaj kiam staris en ornam'
de spikoj la grenkampoj jam,
suspiris ili kune:
Ĉu ventos enaŭtune?

Foliojn ŝiris vento for,
plendadis ili pro dolor':
Ja venos nun post tio
la vintro, frostos ĉio.

Malprvaj estis ili ne,
la vintro venis ankaŭ tre
rapide al ĉi tiuj
mizeraj homoj, kiuj

nun sidas post la fornoj kaj
atendas, ĝis la nova Maj'
verdigos ree ĉion.
Pro kio timi ion?

...

*Traduko de la Germana poemo “Die Sorglichen” de GUSTAV FALKE (*1853-01.11 – †1916-02-08) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1997-02.*

MR-296-1 / Arg-779-1561 (2013-01-19 11:12:46)